20 Februaro 1906. DUA JARO N° 4 (22)

LA ALĜERIA STELO

OFICIALA ORGANO
De la Grupo Esperantista de Alĝero
KAJ DE LA NORDAFRIKO

Oficiala Parto

Grupo Esperantista de Alĝero

KAJ DE LA NORDAFRIKO

RÉUNION DU COMITÉ DU 15 FÉVRIER 1906

La séance est ouverte à 6 heures, sous la présidence de M. Aubert. — Tous les membres sont présents.

M. le Président communique aux membres du Comité le résultat des démarches qu'il a faites dans le but de doter le Groupe d'un local où une exposition permanente de documents espérantistes pourrait être organisée et où auraient lieu les cours et les réunions du Groupe. Ce local étant trouvé, une délégation est désignée pour aller le visiter et prendre une décision définitive.

Il est décidé, en vue de resserrer les liens d'amitié entre « samideanoj », de créer des thés espérantistes qui auraient lieu tous les mois. Le premier thé est fixé au jeudi 22 février, à l'Hôtel Excelsior ; le drapeau espérantiste sera arboré à cet hôtel ponr la circonstance. On décide également d'inviter quelques membres de la presse locale, qui pourront ainsi se rendre compte des progrès accomplis par l'Esperanto.

Après examen de documents reçus et de diverses questions intéressant la propagande, la séance est levée a 7 heures.

STELETO.

CONCOURS D'ESPERANTO

Nous avons le plaisir d'informer nos lecteurs que « Les Annales Africaines », toujours dévouées aux idées généreuses, ont bien voulu accorder leurs colonnes et leur publicité à un PREMIER CONCOURS D'ESPERANTO, qui est réservé aux seules personnes d'Algérie qui n'ont pas encore étudié la langue internationale neutre.

Il s'agit, par la première épreuve du concours, de démontrer

qu'à l'aide d'une simple CLEF, petit dictionnaire pesant 5 grammes et coûtant 5 centimes, des Français peuvent, sans étude préalable, traduire un texte quelconque rédigé en Esperanto

La seconde épreuve tendra ensuite à prouver qu'avec un vocabulaire très simple et des connaissances grammaticales excessivement faciles à acquérir, tout Français peut, après quelques moments d'étude, arriver à traduire sa pensée dans une langue qui compte déjà des milliers d'adeptes dans tous les pays du monde.

Nous engageons les aimables lecteurs de « La Algeria Stelo » à recruter, parmi leurs amis encore un peu sceptiques, le plus grand nombre possible de concurrents.

Pour les conditions du concours et la liste des prix, voir les « Annales Africaines » des 3 et 10 février.

ESPERANTISTA LABORISTARO

Le groupe espérantiste ouvrier de la ville d'Alger a reçu une lettre fort intéressante de M. Padfield (Clinton House, 22, Murray Road, à Ipswich, Angleterre). Les milieux ouvriers anglais sont très partisans d'un organe en Esperanto pour la défense des intérêts internationaux du prolétariat, mais ils conseillent de faire un journal mensuel plutôt que bi-mensuel : l'abonnement serait moins onéreux et les groupements ouvriers auraient plus facilement le temps de lire le journal et de se concerter en vue des suites à donner aux diverses propositions.

NOTA. — La question est toujours en suspens de savoir si le journal sera imprimé et administré à Alger ou à Stockholm.

ASSOCIATION DES COMPTABLES PROFESSIONNELS

Nous avons appris avec plaisir la constitution, sous la direction de notre jeune et sympathique « samideano », M. Migliori, comptable, 9, rue des Consuls, d'un Syndicat de Comptables Professionnels.

Nous espérons que les démarches de M. Aubert, Secrétaire général du Syndicat Commercial, en vue de l'organisation, sous les auspices de cette Association, d'un cours de correspondance commerciale en Esperanto, aboutiront à un prochain succès.

AU SYNDICAT COMMERCIAL

Cette importante association commerciale, qui réunit toutes les sommités du commerce algérois, tenait son assemblée générale annuelle le 8 courant.

Nous détachons du rapport de fin d'année, dont il a été donné lecture au cours de cette réunion, le passage suivant :

« Sur la proposition de M. le Président Tachet lui-même, le Syndicat Commercial a voté une subvention de 100 francs au Groupe Espérantiste d'Alger. Comme président actuel de ce Groupe, je suis heureux de remercier aujourd'hui le Syndicat Commercial réuni en Assemblée Générale et de confirmer devant lui que le Conseil municipal de Paris vient de faire un accueil favorable à une proposition tendant à introduire officiellement l'Esperanto dans toutes les écoles de la ville de Paris ».

Neoficiala Parto

DIAJ UNUAJ PAŜOJ

Kiam infano ekpaŝas, ĝi bezonas, por subteni sin, ian apogilon, kiu estas la patrino sindonema. Sen tio, ĝi nepre falas, kaj tute ne povas ree stari se iu ne relevas ĝin kaj helpas ĝiajn paŝojn. Poste, iom post iom, ĝi timeme provas daŭrigi sian iradon, kaj fine povas senhelpe marŝadi, antaŭen iri en la vivado, unuvorte fariĝi plenaĝa homo.

Tiel same pri nia ĵurnaleto. Kiam ni ekpensis pri ĝia eldonigo, kelkaj mokis nian naivecon provi la faradon de gazeto esperanta en Alĝero. Aliaj diris: « Eble vi eldonos unu aŭ du numerojn, sed poste, vi devos halti, pro manko'da mono ». Aliaj tamen kuraĝigis nin, ĉu per ilia abonpago, ĉu per ilia kunlaboro. Tiuj estis la gvidantoj kaj apogantoj de niaj unuaj paŝoj, kaj dank' al ilia sindonemeco, ni povis, bone malbone, daŭrigi nian entreprenon. Por tiun celon atingi, ni devis kiel eble plej multe malgrandigi niajn elspezojn. La plej grava kostaĵo en ĉia eldonaĵo estas la kompostado: ni povis ĝin forigi, dediĉante ĉiujn niajn liberajn horojn por ĝin fari ni mem. Al ni do restis nur la elspezo pri la materialo kaj la dissendado de nia gazeto. Por disvastigi ĝin, ni. dum la tuta unua jaro, regule sendis ĝin al multaj societoj, grupoj kaj homoj eĉ senpage. Dank' al tiuj oferoj, sukcese povis atingi nia « Alĝeria Stelo » sian plenan unuan jaron; eĉ kiel sana kaj fortika infaneto, ĝi kelke kreskiĝis, dikiĝis, kaj antaŭ ne longe povis akiri dandetan verdan jupeton, kiel decas je fraŭlineto kiu jam ekkomencas iĝi graveta personeto.

Tamen ni sincere konfesas ke nia infano ĝis nun havis mankojn. Ĉefe, kiel ĉiuj samaĝaj hometoj, ĝi uzis kelkfoje iom nekorektan lingvon. Sed ĝi estas laborema lernanto, kaj por sia atenta klopodado, spertiĝis pri la gramatiko kaj la stilo esperantaj, kaj ni esperegas ke de nun, ĝi donos pri tio, plenan kontentecon al siaj legantoj.

Ĝi ankoraŭ plimultigis siajn rilatojn kun la esperantistaro kaj havas, en diversaj landoj, amikojn kiuj promesis sendi al ĝi artikolojn pri ĉiuspecaj objektoj kaj rakontetojn. Dank' al ili, ni povos doni al niaj legantoj multajn neeldonitajn artikolojn interesajn. Sed por plenumi tiun laŭdindan programon ni nepre bezonas la helpon de niaj amikoj. Kiel ni diris supre, dum la unua jaro de nia gazeta vivado, la « Alĝeria Stelo » iel, bone mal-

bone, paŝadis dank' al niaj laboraj kaj monaj oferoj. Nian laboran klopodon ni povas ankoraŭ certigi al niaj amikoj ; sed niaj monaj fortoj ne povus daŭrigi la elspezojn de la lasta jaro. En la komenco de tiu dua jaro de nia eldonado, ni do faras alvokon al ĉiuj niaj legantoj. Ne nur ili abonu « La Alĝerian Stelon », sed ankoraŭ il konigu ĝin al iliaj konatuloj kaj varbu novajn abonantojn. Ju pli multaj ili estos, des pli plena estos nia gazeto. Eldonante ĝin ni ne celis ian monan profiton, sed nur la utilon de Esperanto kies ĝi estas la heroldo sur l' Afrika tero ; helpante nin, niaj amikoj helpos Esperanton mem. Ni do konfidas al ili kaj antaŭe dankegas ilin pro « La Alĝeria Stelo » kaj pro Esperanto !

LA REDAKCIO.

DIVERSAĴOJ

NOVAJ GAZETOJ.

Ni kore salutas kaj al ili deziras longan vivon la sekvantajn novajn gazetojn esperantistajn :

« Unua Paŝo », n-roj 1 kaj 2. Sofio (Bulgarujo).

« Esperantisten », n-ro 1. Fondita de la Stockholma Esperantista Klubo.

« Centrameriko Esperantista », n-ro 1, Gvatemallando.

« Esperanto », n-ro 1. Sofio (Bulgarujo).

Al ĉiuj ni sendas niajn plej korajn bondezirojn.

LA REVUE DE L'ESPERANTO.

Nous avons reçu le numéro de février de cette Revue qui était précédemment publiée dans le « Cicérone », de Boulogne-sur-Mer. « La Revue de l'Esperanto » paraît maintenant sur quatre pages en français et en Esperanto.

Nous ne pouvons que souhaiter bon succès à notre confrère, qui a à sa tête un des plus fervents espérantistes de France, nous avons nommé M. Michaux.

NOVAJ LIBROJ.

« Esperanta Radikaro », de Prof. Th. Cart. — Prezo : 0,60 cent. por la propagando de Esperanto inter blinduloj. Aĉetebla ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ESPERANTA LIGILO.

Monata Revuo en reliefpunktoj por blinduloj. Jare, 3 fr. por ĉiu lando. Direktoro : Prof Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris. — Januaro 1906. Enhavo : Kroniko (Th. C.) ; Problemo ; Poezio : Birdetoj (Fr. Coppée) ; Humoraĵo : Pruvo, Decido ; Miksaĵo : Proverboj (F. Zamenhof) ; Felietono : Parolado de D-ro Zamenhof en Boulogne-sur-Mer.

Alvoko al ĉiuj helpemaj gesamideanoj

Esperanto pli kaj pli progresas en la tuta mondo. Ankaŭ en la ĉefurbo de Moravio, Brünn, kolektiĝis kelkaj entuziasmitaj germanaj samideanoj, kiuj decidis aktive propagandi per paroladoj, kursoj, k. a. Ĉe ĉiu parolado ni intencas aranĝi ekspozicieton de ĉiuspecaj esperantaĵoj por videble pruvi al la nekredema publiko la grandan tutmondan disvastiĝon de nia kara idiomo. Ne havante pro nia laboro liberan tempon por kolekti per interkorespondado tiajn dokumentojn, ni turnas nin al ĉiuj helpemaj ĉiulandaj geesperantistoj kun la ĝentila peto, al ni afable helpi efektivigi nian entreprenon kaj bonvoli sendi, kiel eble plej baldaŭ, ĉiuspecajn esperantaĵojn: propagandilojn, cirkulerojn, gazetajn artikolojn, leterojn kaj precipe ilustritajn poŝtkartojn, kiuj objektoj povus pruvi la facilecon, utilecon, kaj disvastiĝon de nia kara lingvo. Plenumante nian peton, la diverslandaj geesperantistoj helpos al ni starigi la verdan standardon de Esperanto en nia urbo, kie Esperanto bonege taŭgus, kiel paciga lingvo inter ambaŭ, malamike al siaj rilatantaj nacioj en Brünn loĝantaj. Ni kuraĝas esperi, ke pro la bono de nia afero, nia alvoko estos aŭdita, kaj ke ni havos baldaŭ la plezuron sciigi pri la fondo de ĉi-tiea esperantista societo. Ni permesas al ni la peton al ĉiuj Esperantistoj prezidantoj kaj profesoroj diskonatigi nian alvokon kaj esprimas al ĉiuj afablaj helpontoj niajn tutkorajn antaŭajn dankojn.

Kelkaj Brünnaj Esperantistoj.

— Ĉiujn dokumentojn oni bonvolu sendi al la provizora sekretario, KARLO STEIER, en Brünn (Moravio) Rathaŭspasse, 1.

Korespoŋda Fako

S-ro Hans Fleissuer, 14, Schubertgasse I, io, Vienno (Aŭstrujo), deziras korespondadi kun geesperantistoj, per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustritaj aŭ ne.

Speciale esperantigita por *Alyeria Stelo*.

LA MORTO DE MARTINO, LA PAŜISTO

Anekdoto de la ribelo de 1898, en Milano

SEKVO

Virinoj ekscitegataj per monstraj spektakoloj, kun buŝo malfermata kaj grimacantaj dolorajn singultojn kaj montris timigatajn kaj frenezajn vizaĝojn. Resonis insultoj, kiujn la viroj kriegis kontraŭ Italujo, kontraŭ ĝia kuraĝa militistaro

Mario trairis la amason, ĉie ekscitante la batalantojn.

Flozofo Toncaso, per la kubito apogata sur la balkona balustrado, aŭdis la terurajn kriegojn, kaj vidis de sia filo la junan vizaĝon, kovritan per flaviela lanugo, palegan, konsumitan ; liaj okuloj kun sangaj vejnoj, la teruran sulkigo de liaj brovoj, ĉio montris lin kiel ribelanton. La grizaj kapharoj de Tomaso pro teruro staris kaj liaj sekaj okuloj vualigis. Li volus kuri, alvoki sian filon, repreni sian perditan animon. aŭ almenaŭ lin malbeni ; sed lia laca korpo ne obeis plu lia furioza volo.

Lia korpo perdis ian senton, ĝi ŝajnis ke lia spirito sentus nevenkeblan premon de misteraj kaj nevideblaj brakoj, kiuj lin faris tute kriplan, kaj detenis lin, senmovan ĉeestanton de la kruelaj mizeroj, de la teruraj ruinoj, de la sangaj kaj mortaj postsignoj, kiujn lia filo lasis post siaj paŝoj.

Daŭris la batalo, kaj la stratoj pleniĝis per malvivuloj. La burĝoj rifuĝis ĉe la domoj kaj ĉe la strataj anguloj ; la virinoj frenezaj per la teruro, rapide forkuris, kaj la suno de l' ĉielo disĵetis siajn senkompatajn radiojn sur la ribelon.

Aliaj regimentoj alvenis, kaj la pafilegon oni direktis al l' amaso. Tuj, grandegan kriegon puŝis la ribelantoj, kiam ili vidis la teruran ilon de morto. Malespera tremeto ĉiuj skuis : poste, morta silento sekvis. Sed, ree eksplodis kriegoj kaj minacaj gestoj, kaj komencis nova batalo.

La monstro, kun ĝia terura malfermita buŝo, senmove kaj silente rigardis.

Resonis trumpeta averto, Pafado rekomencis. El grupo de ribelantoj, enfermata en proksima domo oni faris pafon, kiu vbndis kavalerian soldaton, rajdanta sur blanka ĉevalo, kaj portante trikoloran standardon Oni vidis lin fali kun la flago kiu kuŝis tere, kiel funebro de Italujo. Ŝajnis ke, kun ĝi, falis la patrujo. Tiam, ĵetante grandan ruĝan fulmon, disĵetante

pecojn, multajn kiel fera hajlo, la buŝo de l' venĝa pafilego tondris kun terura bruego, kiu aeren supreniris, simila je la movo de ondegoj. Post la pafego, homaj korpoj terfalis traboritaj per kugloj; la muroj de la domoj renversiĝis, pordoj kaj fenestroj peciĝis, dum la suno iluminis la ruinojn.

Multe da gepersonoj estis vunditaj en la domoj, kaj la pulvorodoro disvastiĝis en la tutan urbon. Grandega timego ekprenis la ribelantojn, jam lacajn per senutila batalo: tute senkuraĝigitaj ili fariĝis. Ĉiuj disiris, diskuris, malproksimiĝis. La soldatoj faris multe da milit-kaptistoj, inter kiuj estis Mario.

Tomaso vidis sian filon mankatenitan, kiu, inter du gardanicoj, paŝis sub la balkono. Li grincis dentojn; stertore kaj ĝeme sia buŝo balbutis parolon, kiu aere alvenis ĝis la oreloj de Mario: « MI-ZER-ULO! »

La junulo aŭdis, supren rigardis, kaj ekvidis la longan maldikan korpon de sia patro kliniĝantan ekstere la balkono, palega sub hela lumo, sia patro furioze rigarnis lin per koleremaj okuloj.

(Daŭrigota)

DON BERNARDINO RICCI.

Esperantigis GRAFFO ALBERT GALLOIS.



Dekkviŋaŭgusta Ordeŋito

Daŭrigo

Oni diris: « Jen Si-Sliman, l'Ambrur (1) ĵus al li sendis la krucon. » Kaj la junaj Maŭrinoj, kiuj venis el bano manĝante kukaĵojn, direktis sub siaj blankaj maskoj, longajn admirantajn rigardojn al tiu bela arĝenta kruco tiel fiera portata. Ha! oni havas iafoje bonajn momentojn dum la vivo!

Vespere, Si-Sliman estis tuj realironta sian gum'on kaj jam

1) Franca vorto (Empereur) = Imperiestro, malbone elparolata de la Araboj.

li metis piedon en la piedingon kiam ŝauŝ'o (1) de la prefektejo tute spiregantа alvenis lin.

« Jen vi, Si-Sliman, ĉien mi serĉas vin... Rapide revenu, al vi la guberniestro intencas paroli ! »

Si-Sliman sekvis lin nemaltrankvile. Tamen, trairante grandan maŭran kortan en la palaco, li renkontis sian estron de la Araba Oficejo, kiu faris malbonan rideton.

Tiu rido de malamiko timigis lin, tial tremante li eniris la salonon en kiu la Marŝalo Pelissier, duko de Malakof, guberniestro, sidis sur seĝo kiel rajdanto. » Si-Sliman, li diris malafable laŭ sia kutimo kaj per tiu nazsona voĉo, kiu tremetigis liajn kunvivantojn, Si-Sliman, mia amiko, mi estas ĉagrenega... eraro estas.., oni ne volis ordoni vin, sed la kaid'on (2) de la Zug-Zug'oj... estas do necesa ke tuj vi redonu tiun krucon. »

La bela vizaĝo bronzumita de l' aga'o ruĝiĝis kvazaŭ proksimiĝita al forĝeja fajro. Nerva tremo ekskuis lian grandan korpon. Liaj okuloj ekflamis... sed tio estis nur fulmo Preskaŭ tuje li mallevis ilin, kaj kliniĝis antaŭ la guberniestro.

« Vi estas la ĉefo, Sinjoro », li diris, kaj tiriganto la krucon de sia brusto, sur tablon li metis ĝin. Lia mano tremis ekaperis larmoj ĉe la pinto de liaj longaj okulharoj. La mal, maljuna Marŝalo estis kortuŝata.

(Daŭrigota)

A. DAUDET.

Esperantigis A. BAISSAC.

---

1) Pedelo.
2) Araba estro, suraga'o.

☞ **L'Imprimerie TORRENT, 57, rue d'Isly, Alger,** livre aux Espérantistes de superbes cartes de visite, portant, sur le coin gauche (impression verte), le mot « Esperanto » au-dessus de l'étoile espérantiste. Le prix est de 3 francs le 100 (0,25 en sus pour envoi postal). Le numéro d'ordre, imprimé en noir, peut être ajouté au-dessous de l'étoile.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Letires accent. de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris